



**Informoj:**  
Arto :- Literaturo  
Turismo :- Sciigoj

# NIA VIVO

**Administracio**  
kaj **Redakcio:**  
Str. RODA, n.º 14-16

**MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"**

**INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS**

## ECOJ DE HELPLINGVO

Ofte, oftege, ĉiam kaj ĉie oni aŭdas, oni legas la aserton, ke nia kara helplingvo Esperanto devas fariĝi natura same, kiel estas la ceteraj nacilingvoj de la mondo; kvazaŭ, kaj tion diras kora naturamanto, esti natura signifus ĉiam nedubbla supereco rilate al la «malŝatindaj» artefaritaj. Nu, tiu opinio, kvankam tre ĝenerala ĉe la esperantistaro, estas laŭ mi erara kaj naskiĝas precipe, ĉar tiu ĉi eble ĝis nun ne pensis, kiun rolon ludos helplingvo estonte en la mondo, kiam ĝi estos kutime kaj ĝenerale uzata por la reciproka sinkompreno de malsamlingvanoj.

Nuntempe estas en la mondo tiurilate preskaŭ nur du specoj de personoj, nome: esperantistoj, malfeliĉe malmultaj, kaj ne esperantistoj, kiuj ja estas la plimulto, la grandega amaso. La unuaj uzas la lingvon foje por praktikaj celoj, kompreneble; sed precipe kion ili faras, tio estas ami kaj propagandi ĝin, sin okupante pri Esperanto konstante; fakto, kiu okazigas, ke multaj el ili kutimiĝis ĝin paroli tre flue kaj eĉ pensi per ĝi, malgraŭ tio ke ili neniel bezonas rilati kun alilingvanojn. Ili naive kredas pro tio, ke, kiam Esperanto fine venkos, okazos same al la ceteraj homoj.

Nu, ili forgesas, ke la vera, estonta celo de helplingvo estos nur faciligi, kiam bezono postulos ĝin, la diverslandan interkompreniĝon, ne por bagatela amuziĝo nek por lingva propagando tiam nenecesa, kiel nun ni faras, sed por utilaj kaj praktikaj aferoj: komercaj, sciencaj, artaj, sociaj, turistaj, ktp.

Tiam estos tri specoj de personoj rilate al helplingvo: kelkaj, sed entute malgranda parto de la homaro, kiuj bezonos interrilati kun fremduloj oftege; se ĉi tiuj fremduloj estos ĉiam de la sama lando, certe la unuaj lernos ilian lingvon, ĉar finfine pli bone interkompreniĝos tiamaniere kun ili; sed, se ili estas, ĉu de iu lando ĉu de alia je malsama lingvo, tiam la unuaj trovos grandan utilon uzi Esperanton kaj ili fariĝos ja bonegaj fluparoluloj; sed, ni ripetas, tiuj estos malmultnombra escepto. La dua speco konsistos el la grandega amaso, el tiuj personoj, kiuj konos la

lingvon, sed ne bezonos uzi ĝin kutime, sed nur okaze; ĉi tiuj preskaŭ ĉiam kapablos kompreni, kion oni diros al ili kaj esprimi siajn pensojn per nia lingvo, sed ne tre facile, ne senpene, ĉar al ili mankos la necesan, ĉiutagan uzadon; tamen por ili ambaŭflanke malrapida interparolo estos treege utila ĉe tiuj pli-malpli neoftaj okazoj. Fine restos ĉiam malfeliĉe la tria klaso, tiuj, kiuj aŭ neniam lernis la helpan lingvon aŭ preskaŭ tute forgesis ĝin kaj ĝi por ili estas nekomprenebla. Ni rajtas esperi, ke ili estos tre malmultaj kaj negravaj; sed tamen ilia preciza proporcio en la homaro estos montrata de la realo.

Ni konkludas el tio ĵus dirita, ke helplingvo preskaŭ neniam estos komprenata nek parolata, ne nur tiel facile, kiel la propra, nacia lingvo, sed eĉ nek tiel flue, kiel nuntempe uzas ĝin la nuna esperantistaro, se per ĉi tiu vorto ni nomas nur la verajn esperantistojn, t. e.: kiuj konstante parolas kaj skribas nian lingvon, ne la sen sperto lernantojn nek la Esperant'emulojn romantike amantajn ĝian internan ideon, sed kiuj neniam decidis eklerni ĝin aŭ baldaŭ laciĝis je ĝia lernado.

Tio neniel signifas, ke la utilon de helplingvo ni opinias malgranda, kontraŭe, tiam ĝi estos vere utila, nedubbele utila, ĉar ĝi estos uzata por nature bezonataj celoj, tial ke la preskaŭ tuta homaro konos ĝin kaj finfine ĉi tiu estas la gravega, la nepra kondiĉo, por ke ĝi povu esti praktike uzata. Okazas ĉe helplingvo, same, kiel en la telefonservo, se mankas la amaso de abonantoj taŭgas ĝi por nenio.

Ni rimarku do, ke, kiam alvenos tiu sopirata epoko, Esperanto estos sciata sufiĉe de preskaŭ ĉiuj personoj, sed preskaŭ neniu parolos ĝin tute flue kaj ankaŭ, ke preskaŭ ĉiuj uzos ĝin malofte kompare al sia nacia lingvo, kaj nur relative tre malgranda nombro da personoj estos devigataj paroli ĝin ĉiutage.

Nu, kiajn ecojn devas havi sekve helplingvo por plenumi sian specialan celon? Kompreneble ankaŭ specialajn, tute nekompareblajn al tiuj de naturlingvo kaj laŭ kelkaj rilatoj eĉ kontraŭajn.

Ni vidu kial:

Ĉiuj naturaj lingvoj estas pli-malpli komplikaj kaj nelogikaj. Jen fakto; kaj tamen ĉi tiu fakto

ŝajnas kontraŭstari la naturan leĝon de malpligranda penado, laŭ kiu ĉiuj naturaj estaĵoj estas regataj; sed tiu kontraŭstaro ja ne ekzistas, ĉar ni rimarku, ke la komplikoj kaj nelogiko de lingvo estas malfacilaĵo kaj baro nur por fremdulo, kiu volas lerni la lingvon, sed neniel por la enlandano, kiu parolas ĝin de sia infanaĝo. Por ĉi tiu lasta estas ĉiam facile paroli sian nacian lingvon, tial ke la naturaj komplikoj kaj nelogikoj de lingvo ĉiam celas plifaciligi, plibeligi aŭ pliprecizigi ĝin al kiu ĝin uzas ĉiumomente; ili estas malfacile lerneblaj, sed tre utilaj poste, kiam jam estas ellernataj. Jen taŭgaj ecoj por naciilingvo, kiun ni bezonas uzi konstante dum nia tuta vivado. Kio gravas, se ĝi estas pli-malpli malfacile ellernebla de fremdulo? Ni ja ĝin lernis nekonscie dum nia infanaĝo kaj nun por ni estas ĝi tre taŭga kaj facila! Jes ni pravas; sed tio rilatas nur al naciilingvo, neniel al helplingvo.

Por tiu ĉi la afero montriĝas kontraŭa; ĝi nepre devas esti facile lernebla, por ke ĉiuj, kaj ĉi tiu estas, ni jam diris, tute necesega kondiĉo, povu ĝin scii kaj sufiĉe lerte uzi. Troa subtileco kaj troa parolfacilo ne estas bezonataj, tial ke ni nur uzos ĝin probable ĉe kelkaj okazoj por kompreni aŭ esprimi ne tro komplikajn nek tro delikatajn aferojn, kaj subtileco kaj parolfacilo preskaŭ ĉiam estas atingataj per komplikoj kaj esceptoj, kiuj malfaciligas la lernadon. Estas necese elekti: aŭ facilo por lerni, aŭ facilo por paroli, kaj pri helplingvo ni devas dubi nek eĉ momenton: estas ja multe pli grava la unua eco, ol la dua.

Kompreneble oni devas prudente kombini ambaŭ kvalitojn, kaj ĝuste tio ĉi estas iu el la plej gravaj meritoj de nia majstro, se oni volas atingi, ke lingvo estu ne nur lernebla, sed ankaŭ parolebla; sed, ni ripetas, pri lingvo internacia havanta helpan celon, kiel okazas al Esperanto, la lernofacilo devas superregi la parolfacilon.

La nuna Esperanto kun siaj proksimume 5.000 oficialaj radikkvortoj estas tre facile lernebla kaj sufiĉe facile parolebla. Jen prudenta proporcio el ambaŭ kvalitoj; sed en la lastaj jaroj oni povas rimarki senbridan inklinon, precipe ĉe la Esperanto-verkistoj kaj tradukistoj, enkonduki laŭ tute privata maniero, en la lingvon grandan amason da novaj vortoj, kiuj malfaciligas la lernadon kaj komplikas la lingvon kaj tio ĉi okazas nur por imiti la naciajn lingvojn, kiuj tamen celas tute alian aferon, ol helpa, kaj pro la erara kredo, ke tiu ĉi lasta devas ankaŭ fariĝi natura kaj kreski kaj evolui tute nature, tute libere, t. e., same kiel la unuaj, malgraŭ tio, ke ĝia esenco kaj ecoj estas preskaŭ kontraŭaj al tiuj de la unuaj. Estas la sama afero, kiel se ni volus, ke ĝardeno, kiu ja estas artefaritaĵo, kresku tiel nature kaj sovaĝe, kiel Afrika arbarego. Ni nur atingus, ke la unua

fariĝu malbela, maloportuna kaj mizeraspekta karikaturo de la dua. Ĝardeno kaj praarbaro estas ambaŭ ŝatindaj kaj bonaj aferoj, sed ĉiu el ili por sia difinita celo.

Esperanto do, kiu ja estis, estas kaj estos artefaritaĵo, bezonas esti zorgata kaj gvidata de la Esperanto-Akademio aŭ iu ajn alia, rajtigita lingvokapo, sed ne kreski nature kaj anarĥie, se ni ne volas, ke ĝi difektiĝu kaj perdu siajn plej ŝatindajn ecojn, kaj por tio ni, la esperantistoj, devas memvole obei la decidojn de nia lingva institucio kaj rifuzi ĉiujn neoficialajn vortojn, ne konsiderante ilin, kiel apartenantajn al nia lingvo. Alimaniere ni memklopodos nekonscie al ĝia iompostoma netaŭgeco kaj malsukceso.

RAMÓN DE SALAS.

## ◀ EKSTERLANDAJ PAGOJ ▶

\*\*\*

Mia cel'—  
 Al la bel'  
 Al la strango, sekreto, kaŝito,  
 Eĉ de l' viv'  
 Pozitiv'  
 Bonodoras misteron de l' mito.  
 La senlim'  
 De l' anim'  
 Ĝia bril' kaj malluma profundo,  
 Tiras min,  
 Kiel vin'  
 Al de l' sentoj kantantaj abundo.  
 Ĝia pens'  
 En intens'  
 Estas sago fluganta de l' fulmo,  
 Kaj ramol'  
 De la vol'  
 Min allogas en ombron de l' ulmo.  
 Ruĝa bel'  
 De l' ribel'  
 Ĉu ne estas vulkan-erupcio?  
 Kaj trankvil'—  
 La rebril',  
 Blanka sonĝo de l' norda glacio?  
 Flugas ter'  
 Tra l' eter',  
 Kiel bird' en senlima ĝardeno,  
 Brilas sun',  
 Revas lun'  
 Kaj stelaroj pensigas pri l' pleno.

VSEVOLOD LIBERT.

Krimea.

## ▶ POSTKARTOJ KUN KLARIGO EN ESPERANTO ◀

Ni sciigas ĉiujn Fratecanojn, ke jam estas en la klubo por la ĉiutaga disvendado la belegaj poŝtkartoj de Zaragozo kun klarigo en Esperanto (Laŭ nia scio, la unuaj tiaspecaj aperintaj en Hispanlando).

Ilijaj prezoj estas jenaj: Kolekto de 10 poŝtkartoj, 2 ptoj; Unuopa poŝtkarto, 0'25 ptoj.

# H E Z I T O

(Daŭrigo)

## INTERAKTA AMUZAĴO DE JOSEFO ORÓS

Kore dediĉita al S-ro Inglada.

(Resumo pri tio antaŭe publikigita: Ĝardeneto kie F-ino Karmen konsilas al sia filino Isabel ke ŝi ne elpelu ŝian fianĉon, kiu hodiaŭ malfruiĝas. Isabel, por profiti tion siacele, deziras ke Ludoviko ne venu, sed li, fine, alvenas).

### SCENO II<sup>a</sup>

(Ludoviko eniras en la ĝardeneton kun skatolo da dolĉaĵoj. Julia ree eklegas kun serioza mieno).

**Ludoviko.** Bonan tagon (manprenas F-ino Karmen). Kiel vi fartas?

**Karmen.** Bone, ĉu vi?

**Ludoviko.** Ne tute bone. Hieraŭ vespere mi ricevis leteron el mia familio per kiu oni diras al mi, ke mia patrino estas iom serioze malsana kaj mi estis la tutan nokton maltrankvila el la timo ke tio estas gravaĵo. Hodiaŭ frumatene mi petis telefonan komunikigon, kiun mi ĵus faris, kaj tio trankviligis min iomete. Tia estas la kaŭzo de mia malfruiĝo (rigardante flanke Julian kiu daŭras legi).

**Karmen.** Mi ĝojas ke tio ne estas tiel grava, kiel vi timis, kaj mi deziregas ke ŝi baldaŭ plene bonfartu.

**Ludoviko.** Dankon S-ino Karmen, kvankam mi ne esperas ke ĝi tiel okazos. La malsano de mia patrino estas kronika. Ŝi de dudek jaroj suferas ĝin, kaj iu ajn kaŭzo, iu subita veterŝanĝo plimalsanigas ŝin.

**Karmen.** (Rigardante Julia-n). Al mi ŝajnas ke hodiaŭ estos tempesto.

**Ludoviko.** Bonan tagon, Julia.

**Julia.** (Serioza). Bonan tagon.

**Ludoviko.** Jam mi atendis vian respondon, kiam mi antaŭe salutis...

**Julia.** Mi ne konstatis.

**Ludoviko.** Ĉu vi ne konstatis ke mi alvenis aŭ ke vi devas respondi la saluton?

**Julia.** Mi ne atentis ĉu vi salutis.

**Ludoviko.** Oni devas kredi iun ne tre ĝentila, por ne supozi, ke enirante, li ne tuj salutu.

**Julia.** Mi estis tre absorbita per tiu ĉi libro kaj mi ne aŭdis vin.

**Ludoviko.** Aŭ vi ne volis aŭdi min. Sendube la malkontento ŝtopis viajn orelojn.

**Julia.** Ĉu mi malkontenta? Mi ne havas kialon.

**Ludoviko.** Mi supozis ke pro mia malfruiĝo.

**Julia.** Vi estis, kredeble, okupata.

**Ludoviko.** Ĉu vi ankaŭ ne aŭdis la kialon?

**Julia.** Nek ĝi interesas min. Vi plene rajtas agi laŭ via plaĉo.

**Ludoviko.** Malmultaj estas, kiuj povas tiel agi.

**Julia.** Mi ne scias, kiu povas malhelpi al vi pri tio.

**Ludoviko.** Vi kaj mia koro. Sed ne faru tian mienon. La malsaneco de mia patrino igis min veni pli malfrue ol kutime. Certe mi pekis ne sendante al vi avizon, sed mi kredis ke la afero ne estos tiel longa. Pardonu min kaj akceptu tiujn bombonojn por rekontentigo.

**Julia.** (Prenas la skatolon kaj lasas ĝin sur la tableto. Seke:) Mi tre dankas.

**Ludoviko.** Ĉu vi ne manĝas unu por dolĉigi tiun malmildan karakteron?

**Julia.** (Kun kolero). Tre bone!! Ĉu plie ŝerĉaĵo? Atentu do, ke mi ne estas preta tion toleri. Mi plej volonte havas la karakteron kiun mi havas.

**Ludoviko.** (Trankvile). Iu vendproponis karakterojn kaj neniun li povis vendi. Ĉiuj estis ravitaj pri la sia.

**Julia.** (Aparte). Kaj li ne koleras...!!!

**Ludoviko.** Vi ja ne estus escepto.

**Karmen.** (Aparte). Vere tiu fraŭlo havas paciencon. Se mi estus li, mi jam estus ĉion sendinta al la diablo. Li estos bona bofilo...

**Ludoviko.** Ĉu vi volas ke ni promenu kiel en aliaj tagoj?

**Julia.** Panjo ne volas.

**Karmen.** Neniame mi malpermesis tion kaj hodiaŭ ne estas motivo por ke mi tion faru.

**Julia.** (Rigardante kolere sian patrinon). Nu, ĉar mi ne volas!! La kapo min doloras, kaj ankaŭ la piedoj!!

**Ludoviko.** Mi bedaŭras. Eble vi ankoraŭ ne rimarkis ke mi staras, kaj se ni ne promenos...

**Julia.** (Eltiras el la domo seĝon kiun ŝi metas iom malproksime de la sia. Denove ŝi eksidas kaj legas la libron).

**Ludoviko.** (Prenante la seĝon kaj sidante apud Julia). Ĉu la malpaceto daŭros multe ĉe vi?

**Julia.** Mi jam diris al vi antaŭe ke mi havas neniajn motivojn por esti nekontenta.

**Ludoviko.** Ĉu al vi estas same ke mi alvenis malfrue?

**Julia.** (Faras signon indiferentecan).

**Ludoviko.** Ĉu vi ne pensis ke mi povus ne alveni plu?

**Julia.** Ĝi okazus ĉar vi kredus konvene fari tiel.

**Ludoviko.** Ĉu por vi tio ne estas grava?

**Julia.** Kial? Se vi kredas ke mi havas malfablan karakteron kaj vi konvinkigis pri tio ke mi ne estas la edzino, kiun vi deziras, nenio pli natura ol via foriro el mi.

**Ludoviko.** Sed almenaŭ mi donus al vi pravigojn.  
**Julia.** Por kio? Ili estas nenecesaj. Ili estus ridindaj klarigoj.

**Ludoviko.** (Serioza). Por kio? Por ke vi ne kredu min tia, kia mi ne estas. La klarigojn, eĉ se ili estas ridindaj, mi tuj donos al vi: Mi kredis, unue, ke tio estus malplaĉo kiel aliaj, kiujn vi havis, sed tia indiferenteco ĉe vi, certigis min pri la timo kiun mi havis; ke vi ne amas nin. Tion ĉi mi vidis de kiam komenciĝis niaj rilatoj: sed mi kredis, ke la tempo kaj mia amo ŝanĝus la situacion. Ĉiuj penoj, kiujn mi faris tiucele estis nefrukto-donaj; kial, do, daŭrigi tiel plu. Mi vidas ke vi suferadas, ĉar vi ne trovas motivojn por min elpeli; ĉar mi ne donas ilin al vi. Ne turmentigu plu. Mi amas vin plenkore kaj pro tio mi deziras, ke vi ne suferu. Mi foriras kaj mia plej granda ĝojo estos iam scii ke vi estas plene feliĉa kun la homo de vi elektita. (Li stariĝas). Adiaŭ, Julia (manprenas ŝin). Ne forgesu ke Ludoviko ĉiam amos vin. Estu certa, ke neniu en la mondo amos vin pli ol mi. Pro tio mi meritas, almenaŭ, ke vi ne malpardonu min. Adiaŭ S-ino Karmen (manprenas ŝin). Jam vi vidas, ke tio ne povas esti. Ni estus tre malfeliĉaj!

**Karmen.** (Malgaje). Jam mi konstatis tion.

**Ludoviko.** Kaj nun, perdinte la solan iluzion, kiu detenis min, mi penas atingi la fervojon, kiu eliras je la dekunua por iri vidi mian patrinon. Mi eĉ forgesis mian filan devon!!

**Karmen.** Via patrino senkulpigos vin. Kredu min. Tion diras al vi alia patrino. Nur estas necese, ke vi trovu ŝin resanigita.

**Ludoviko.** Dankon. (Eliras tra la pordo de la ĝardeneto).

(Daŭrigota).

## SALUTO

Ĉar en la ĵus pasinta, ĝenerala kunsido ordinarara faris al mi la karaj Fratecanoj la altegan kaj neniel merititan honoron min elekti por la Prezidanta Posteno, mi nepre volas alsaluti de tie ĉi korege ĉiujn geklubanoj same, kiel nian ja neanstataŭeblan Eksprezidanton Sro. Orós, kiu tiel alte metis la nomon «Frateco» en nia urbo kaj en la Esperanto-mondo.—RAMÓN DE SALAS.

## FUNEBRAJ LITEROJ

En la pasinta monato Januaro plej entuziasma esperantistino el Huesca Fino. R. del Pueyo mortis pro grava operacio. Ni tre bedaŭras tiun malfeliĉon kaj sendas plej koran kondolencon al ŝia familio kaj al la esperantistoj el Huesca.

## SCIIGOJ

La Direkta Komitato de Frateco por la nunajaro estas: Prezidanto, S-ro Ramón de Salas; Viceprezidanto, S-ro Emilio Bruquetas; Sekretario, S-ro J. M.<sup>a</sup> Uñez; Vicsekretario, S-ro J. Puértollas; Kasisto, S-ro Josefo Larruga; Vickasisto, S-ro J. Esteban; Kalkulisto, S-ro L. Til; Vickalkulisto, S-ro J. Muñoz; Voĉdonantoj: 1.<sup>a</sup>, Fino. Pilar Salvo; 2.<sup>a</sup>, S-ro R. Gastón; 3.<sup>a</sup>, S-ro E. Artigas; 4.<sup>a</sup>, S-ro Manuel Maynar.

\*\*\*

De «Sociedad ortografica racional mejicana» ni ricevis la jenajn librojn: «Kartiya de ortografia racional mejicana», «Ortografiko», «Homofonologia», «Arpegios», «Ekos Nacionales», «Los apuros de un enamorado».

Al S-ro Prezidanto de tiu societo ni kore dankas tiun sendon.

\*\*\*

Ni petas al la Fratecanoj bonvolu sendi la kotizajon de NIA VIVO por la nuna jaro.

\*\*\*

Baldaŭ ni ricevos la Esperanto filmon pri Kolonjo. Ni avizos kie haj kiam ni projekcios ĝin.

## SPRITAĴOJ

En teatro.

Homo, malriĉe vestita, sidas sur apogseĝo ĉe la teretaĝo.

Servisto de la teatro alproksimiĝas, kaj ĝentile demandas: Sinjoro, ĉu vi bonvolus montri al mi vian bileton?

—Vidu, sinjoro.

—Vi ne estas en via loko; vi devas iri tien supren...

—Jes, jes, mi scias, sed... mi estas falinta.

\*\*\*

En juĝejo.

... kaj oni devas kondamni la kulpulon je dek jaroj, tri monatoj kaj unu tago da malliberejo, kaj pago da tri mil pesetoj, kaj...

La komdamnato.—Aldonu, aldonu... ĉar vi ne devas pagi tion...—P. BESCÓS.